



Partopreno de Astura Esperanta Asocio en la festado de la 4a Cenjara Jubileo de la "Kihoto"

Sed tiu dato de la 3a de marto de 2006 estas memorinda por ni ankaŭ pro alia kialo. Tiutage komenciĝis en la Universitato de Oviedo kurso de Esperanto, kiun gvidis la menciitaj María José Álvarez Faedo kaj Carlos Enrique Carleos Artime. Estis la unua fojo en kiu okazis io simila en nia regiono.

La dua transdono de la Kihoto en Esperanto far de nia **AEA** okazis la 20an de aprilo en la Fakultato pri Filologio de la Universitato de Oviedo, en iu akademia akto. Profesoro Antonio Valen prelegis pri la traduk-verkado de Fernando de Diego ĝenerale, kaj ĉefe pri ties tradukado de la Kihoto al Esperanto. Prezintis la preleganton doktorino María José Álvarez Faedo, el tiu Universitato de Oviedo. Poste oni efektivigis la transdonadon de la ekzemplero de la Kihoto en Esperanto, donita de la **Fundacio de Esperanto**, kaj ekzempleron de la verko **ASTURA BUKEDO**, donita de **Astura Esperanta Asocio**, al Isabel Suárez Melgar, direktorino de la biblioteko pri humanismaj studoj de tiu Universitato de Oviedo. Ankaŭ pri tiuj aktoj estas ampleksa informo en nia interreta paĝo.

Alia akademia akto en la sama fakultato de tiu Universitato de Oviedo okazis la 19an de majo de tiu sama jaro. Tiutage estis la fermo de la kurso de Esperanto kiun estis gvidinte tie María José Álvarez Faedo kaj Carlos Enrique Carleos Artime.

Kiel ferma akto de la kurso estis prelego pri Esperanto kaj ties iniciatinto L.L. Zamenhof. La prelegon faris Faustino Castaño kaj krom la gestudentoj partoprenintaj la kurson estis ankaŭ alia invitita publiko al kiu interesis la temo.

Pri tiu akto estas raporto en la interreta paĝo. Ekde ĝia ekfunkciado, tiu paĝo atestas pri ĉiuj aktoj de la vivo de nia E-asocio sed krome ankaŭ pri multaj aliaj aferoj ĉar ĝi estas malfermata al ĉiutipaj temoj cele montri al la publiko ke pere de esperanto oni povas pritrakti ĉiutipajn temojn.

La 81a numero de **HELECO**, kiu aperis en oktobro de 2006 estis speciale dediĉita al Kristoforo Kolombo kaj ties famaj geografiaj malkovroj rememorante la morton de tiu fama maristo kiu okazis ĝuste antaŭ 5 jarcentoj. Ankaŭ ĉi tiu numero de la revuo estas tute kolora. Post 15 jarojn, la revuo ĉesis esti du-lingva kaj denove estis eldonita nur en Esperanto. Krome oni ne faris el ĝi tiom da ekzempleroj por distribuado kiom antaŭe. Jam ni menciis tion ke la sperto de tiu dekkvinjara periodo estis ke tiuforma eldonado ne estis rentebla de esperantista vidpunkto kaj krome rezultis tre alteosta de ekonomia vidpunkto. Cetere, ĉar la revuo estas publikigata en la retroŝto de la Asocio, ĝi povas esti vidata en ĉiuj mondpartoj kaj en plejparto el la mondo la hispana lingvo ne estas pli bone konata ol Esperanto mem.